

BRAZILA ESPERANTISTO

52-A JARO

JANUARO - MARTO 1958

N.º 526-528

CARATINGA — ŜTATO MINAS GERAIS



Urbo, kie okazos la 3-a Ŝtata Esperanto-Kunveno (10-13 Julio 1958)

JANUARO - MARTO 1958

52-a Jaro

Nº 526 - 528

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO Respondeca redaktoro (redactor
principal):**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefono: 42-4357

 Sidejo de la Brazila Societo
de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

 Senpaga por anoj de B. E. I.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO
1956**(De acordo com os Estatutos todos os membros
são automaticamente filiados à organização
mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	100,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	250,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	400,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	600,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	8.000,00

* Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

MEMORLIBRO

de la

Tria Esperantista Eŭkaristia
Mondkunveno

Okazinta en la kadro

de la

XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso

Kompilata de

Pastro D-ro Johano B. Kao O.F.M.

Prezo Cr\$ 150,00

— o —

HISTORIAS DO DIA PARAIBA

J. B. Mello e Souza

Contos

Cr\$ 35,00

— o —

FARRAPOS D'ALMA

Carlos Torres Pastorino

Sonetos

Cr\$ 100,00

NOVAJ SCIENCAJ ELDONAĴOJSCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO,
Ing. Rudolf Haferkorn, kem. d-ro Kurt
Dellian kaj prof. d-ro F. J. Belinfante,
eld. de Japana Esperanto Instituto, Tokio.

Prezo bind. Cr\$ 550,00

— o —

**ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL
DICTIONARY**

(Angla-Esperanta Kemia Vortaro)

D. R. Duncan, Ph. D., B. Sc.

Prezo Cr\$ 250,00

— o —

**SCIENCO KAJ PSEŬOSCIENCO PRI
HEREDO KAJ RASO**

Populara skizo de Paul Neergaard

Prezo Cr\$ 35,00

— o —

LA VIVO DE LA PLANTOJ

Paul Neergaard

Prezo Cr\$ 250,00

BRAZILA ESPERANTISTO

52-A JARO

JANUARO - MARTO 1958

N.º 526-528

UM GESTO BRASILEIRO AMIGO

Se, ligados pelo Esperanto, os esperantistas de todo o mundo são geralmente amigos, os esperantistas portugueses e brasileiros são-no duplamente por terem duas línguas a aproximá-los, a portuguesa e o Esperanto.

Assim, se os nossos irmãos de lá do Atlântico vibram contentes com o progresso do Esperanto no seu país, saboreiam o auxílio pecuniário da parte de quase todos os seus Estados no movimento esperantista, agradecem o apoio oficial de suas edilidades, que dão o nome de Zamenhof ou o Esperanto a ruas e praças de muitas cidades, organizam congressos nacionais com a presença de ministros nas suas sessões e se orgulham da sua associação nacional, a Liga Brasileira de Esperanto reconhecida, por decreto de há muito promulgado, de utilidade pública, também encaram com desgosto a ausência de Portugal no movimento internacional esperantista.

O povo brasileiro vibrou com a visita do Sr. General Craveiro Lopes ao Brasil e especialmente o esperantismo brasileiro reconheceu em S. Exa. alguém, suficientemente compreensivo e forte, para poder proteger e eficientemente auxiliar os queridos «samideanos» portugueses nas suas tão legítimas ambições.

ALiga Brasileira de Esperanto ofereceu a S. Exa., primorosamente encarnadas, as seguintes obras em Esperanto: «Antologio de Brazilaj Rakontoj», «Rui Barbosa», «Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo» e «Santos Dumont, la aerpioni-ro».

Uma carta, junta aos livros, descrevia a significação do Esperanto e a sua situação de amizade para com o Governo Brasileiro e, entre muitos fatos positivos apontados expunha o do XV Congresso Brasileiro de Esperanto, que teve como orador oficial na sessão de abertura no Palácio Itamarati, o Embaixador Dr. José Carlos de Macedo Soares, Ministro das Relações Exteriores.

De Portugal, mais tarde, numa carta amável, o Secretário da Presidência agradeceu à Brazila Esperanto-Ligo o presente dos livros e a carta.

Não sabemos se os esperantistas portugueses poderão ver finalmente, e ainda em vida do signatário, aprovados os estatutos da Portugala Esperanto-Asocio; nada surgiu, até à data, que o faça prever, mas nós, no jornal «República», que sempre tão patriótica e compreensivamente nos acolhe, queremos

LETEROJ

TRADUKO de la Leteroj de la Sekretariejo de ŝtato de Lia Sankteco Papo Pio XII kaj de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj al Pastro Johano Baptisto Kao O.F.M. por danki lian donacon de la «Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno».

1. *Letero de la Sekretariejo de ŝtato de Lia Sankteco*

Sekretariejo de ŝtato de Lia Sankteco n.º 395471

El Vatikano, La 15-an de Febr. 1957
Tre Honorinda Sinjoro

Mi rapide sciigas al Vi ke jam estis prezentita al la Suverena Pontifiko la volumo de Vi kompilita kun la titolo: «Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno, okazinta en la kadro de la XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso», kiun Vi donace sendis al Li pro religia kaj fila sento.

Lia Sankteco esprimas al Vi multan dankon pro la honordonaco kaj bondezirante la disvastigon de la verko, favore donas al Vi la Apostolan Benon, kiel aŭguron de la ĉielaj gracoj.

Samtempe, kun la justa respekto, mi subskribas min

patentear desde já, públicamente, à Liga Brasileira e especialmente ao seu illustre presidente, dr. Carlos Domingues, a nossa mais viva e indelével gratidão.

Saldanha Carreira

(«República», de LISBOA, de 14-11-57).

Via tre sindonema

A. DELL'ACQUA

Anstataŭanto

Al Tre Honorinda S-ro Pastro Johano Baptisto Kao O.F.M. — Rio de Janeiro

2. *Letero de la Prezidanto de Konstanta Komitato de I.E.K.*

Konstanta Komitato de Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj

Via dei Portughesi, 2 — Roma, la 7-an de Februaro 1957

Tre Honorinda Patro

Kun ĝojo mi ricevis de Via bonvolo la tre belan volumon kiu estas titolita: «Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno» kaj kiu rakontas en Esperanto ankaŭ la agojn kaj dokumentojn de la Internacia Eŭkaristia Kongreso okazinta en Rio de Janeiro en la jaro de Savo 1955.

Inter la neforgeseblaj eŭkaristiaj solenaĵoj tie okazintaj, mi jam admiris Vian laŭdindan klopodadon por la propagando de la lingvo Esperanto, kaj nun profitante novan okazon per letero mi plej sincere gratulas Vin kaj bondeziras ke la lingvo Esperanto disvastiĝu pli kaj pli en la tuta mondo kaj ke ĉiuj popoloj uzu ĝin tiel ke estu unu komuna lingvo por konfesi la Fidon kaj Hostion, kiu estas unu sola por ni ĉiuj.

Multan saluton al Vi, kara Patro en Kristo, kaj al Viaj Kunlaborantoj mi sendas, kaj elkore benas Vin kaj viajn laborojn.

Via plej sindonema en la Sinjoro

† JOSEFO DA COSTA NUNES

Prezidanto

Al Pastro Johano Baptisto Kao O.F.M.
Convento de Sto. Antonio — Largo da Carioca — Rio de Janeiro — Brazilo.

43-a Universala Kongreso de Esperanto

2-9 Aŭgusto 1958

MAINZ — GERMANUJO

La Internacia Somera Universitato anoncas jenajn prelegojn:

- Prof. W.E. Collinson: “La etimologio en naciaj kaj internaciaj lingvoj”;
- Prof. Ivo Lapenna: “Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj (1948-1958)”;
- D-ro G.F. Makkink: “Kiel la birdoj flugas”.

La Belarta Konkurso anoncas sian naŭan konkurson pri:

- Originala Poezio; — Tradukita Poezio;
- Originala Prozo; — Originala Drameto.

La Urbo Mainz akceptos la tutan kongresanaron en la kortego de la Kongresejo.

La Palaco de la Elektantaj Princoj de Mainz, unu el la plej belaj ekzemploj de la germana renesanco, en situo fronte al la Rejno, estos la Kongresejo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

La 3-a Internacia Infana Kongreseto okazos samtempe kun la Universala Kongreso en la Feria Domo de Gonsenheim.

Estas akceptataj nur infanoj, kiuj parolas Esperanton, inter 6 kaj 13 jaroj.

La 28-a Internacia Kongreso de la Blindaj Esperantistoj okazos en Mainz dum la Universala Kongreso.

La Internacia Asocio de Juristoj Esperantistaj anoncis publikan juristan kunvenon kun debato de la temo: “Libereco de la penso kaj libereco de esprimado”: partoprenos en la diskutoj juristoj de diversaj juraj sistemoj.

La Universala Ekspozicio estos montrata en Mainz dum la Universala Kongreso.

La Urbo Mainz decidis disponigi al la kongresanoj specialan tramkarton, validan sur ĉiuj urbaj linioj dum la tuta kongresa semajno, je kosto de 5 markoj.

Sub la oficialaj aŭspicioj de la Urbo Mainz, de la 31-julio/2 aŭgusto 1958 okazos Internacia Seminario por prepari kursgvidantoj laŭ rekta metodo, gvidota persone de S-ro Andreo Cseh.

La Urbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, surbendigis sur magnetofona rubando oficialan invitsaluton en Esperanto, direktitan al la Esperantistoj en la tuta mondo. Esperanto-societoj aliĝintaj al Landa Asocio povas senpage ricevi la bendon “La Urbestro de Mainz invitas la esperantistojn” (rapideco 9,5), mendante ĝin per simpla poŝtkarto ĉe la kongresa oficejo.

Dum la Kongreso okazos jenaj samtempaj tuttagaj ekskursoj:

1. persipe sur la romantika Rejno, preter la fabela Loreley, kun vizito ŝnurfervoja al “Germania” kaj tagmanĝo en Bacharach/Steeg;
2. Per speciala vagonaro kun danckupeoj al la pentrinda Heildelberg, kun tagmanĝo en la Festhalo de Eberbach;
3. Per aŭtobuso, veturante en la montara Taunus regiono, al la naskiĝurbo de Goethe, Frankfurto, kun akcepto en la Urbodomo kaj tagmanĝo en la ekzotika Palmĝardeno.

Du postkongresaj ekskursoj iros:

1. Kvartage al la folkloraj montoj de Bavarujo kaj Tirolo;
2. Tritage al la MondEkspozicio en Bruselo.

Dumtagaj vizitoj tra Mainz kaj Wiesbaden okazos dum la Kongreso.

La Loka Kongresa Komitato decidis oficialigi kaj subteni dumkongresan amuzan vesperon por gejunuloj, organizata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Prof. Hideo Yagi prelegos pri “Domaĝo de la Atombombo en postaj jaroj”.

La Internacia Arta Teatro, formita grandparte de jugoslavaj aktoroj, sub la reĝisorado de S-ro S. Flego el Parizo, ludos en Esperanto dum la Universala Kongreso la ĉefverkon de la norvega verkisto Ibsen, “Fantomoj”.

Ĝis la fino de januaro aliĝis 976 kongresanoj el 29 landoj.

G. C. FIGHIERA
Konstanta Kongresa Sekretario



Brazila Kroniko

BAHIA

Salvador — Novaj E-kursoj starigitaj: ĉe Associação Bahiana de Esperanto, gvidas prof. Onias Almeida; ĉe la Filozofia Fakultato, prof. Leopoldo Knoedt komencis elementan kurson, post parolado de prof. Godofredo Góes kaj ekspozicio de Esperantaĵoj en la Biblioteko.

Niaj samideanoj en Bahia havas la ideon eldoni la verkojn de la glora brazila poeto Castro Alves en Esperanta traduko, okaze de la estonta Brazila Kongreso de Esperanto.

Itapetinga — Itapetinga Kultura Asocio, per sia altparolila servado faras ĉiusemajne Esperantan programon «No mundo das letras». Prof. Penna, prezidanto de I. K. A., faris paroladon pri Esperanto. La Urbestro de Itapetinga, S-ro Juvino Oliveira, estas tre favora al la Esperanta Klubo kaj sugestis, ke ĝi fariĝu societo pri publika utileco.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — Dum la monato aŭgusto vizitis ĉi tiun ĉefurbon la argentinaj samideanoj prof. Jorge Hess kaj lia edzino s-ino Klara Hess. De la 5-a ĝis la 29-a de tiu monato prof. Hess gvidis elementan E.-kurson por pli ol 50 gelernantoj, kaj ankaŭ konversacian rondon por lokaj esperantistoj, ĉe la Lernejo por Tradukistoj kaj Interpretistoj, kies prezidanto kaj direktoro afable disponigis salonon en la

sidejo de la Lernejo. Gratulojn al Sociedade Mineira de Esperanto, pro la sukceso.

Lavras — Fondiĝis en ĉi tiu urbo E-klubo nomita «Gremio L. L. Zamenhof». S-ro Rêmuldo T. Futini, kiu tion sciigis al ni, zorgas pri ĝia aliĝo al B. E. L.

Patos de Minas — Nia samideano Waldemar A. Mendes, prezidanto de la «Kultura Centro Ruy Barbosa», komunikas la starigon de E.-kurso ĉe la Komerca Teknika Lernejo Pic XII.

Ubá — Dum la Zamenhofa-Semajno (en dec. 1957) la tieaj samideanoj organizis ekspozicion de Esperantaĵoj, kiu estis tre vizitata kaj ŝatata.

Uberlândia — En la sidejo de «Centro Espírita Fé, Esperança, Caridade» oni faris Esperanto-kurson kaj solene transdonis diplomojn al la 19 kursfinintoj Direktis la kurzon nia fervora samideano d-ro C. A. Wutke.

STATO RIO DE JANEIRO

Morro Agudo — Nia amiko Abel Marques, kiu antaŭ nelonge transloĝiĝis al tiu distrikto de la Komunumo Nova Iguaçu, malfermis E-kurson, en la Strato Lionel Gouveia, 101. Gratulon kaj sukceson!

Campos — Estas ĵus fondita, en ĉi tiu grava urbo, «Campos Esperanto-Klubo», sekve de klopodoj de niaj gesamideanoj, Joel Soares, Décio Lima Elcio Coutinho kaj Marlene Pereira. Provizora adreso: Rua 21 de abril, 174 — Campos — Estado do Rio. La pro-

fesorino Maria Augusta Duncan pentris la portreton de d-ro L. Zamenhof kaj cferis ĝin al la Klubo.

SÃO PAULO

— Du novaj E-kursoj funkcias: ĉe São Paulo Esperanto Klubo (SPEK) gvidas fraŭlino Amelia Levy kaj Ivon Barbosa.

— Interfrata Esperanta Klubo sendis petskribon al la Rektorado en la Fakultado de Filozofio, Sciencoj kaj Beletristiko de la Universitato de São Paulo, pri enkonduko de Esperanto. La Rektorado akceptis kaj aprobis la proponon por la starigo de du senpagaj E.-kursoj.

RIO DE JANEIRO (DF)

— La revuo Brasil Rotário (julio 1957) publikigis verkaĵon de la rotariano José Reddo Cid, kun vasta programo por la Rotary-Klubo. La 19-a sugestoj de projektoj farendaj estas la organizado de centroj por la instruoj de Esperanto kaj aliaj vivantaj lingvoj.

— «Grêmio Cultural Rui Barbosa», asocio de la lernantinoj ĉe la Instituto de Educação do Rio de Janeiro organizis Esperanto-kurson, sub la gvido de unu el la lernantinoj, Nadir do Carmo Rezende. Sekvis la kurson 29 lernantinoj.

III Convenção Mineira de Esperanto

Caratinga, Estado de Minas Gerais

10 a 13 de Julho de 1958

Sob o patrocínio da Liga Brasileira de Esperanto e da Sociedade Mineira de Esperanto, Organizada pelo Grupo Esperantista de Caratinga

Presidente de honra: Sr. Joaquim Vicente Bonfim, Prefeito.

Comissão organizadora: Pres. Dr. Luis de Azeredo Coutinho, Vice-Pres. José Silvano Portes, Sec. Elmano M. de Carvalho e Sebastião X. dos Reis, Tes. João Silvestre Gomes, Subcom. de recepção, hospedagem, festas, exposições, feira de livros, reportagem e propaganda.

Esboço do programa: Dia 10 — 19,30 h. Sessão solene de abertura (Colégio N. S. do Carmo). Dia 11 — 8,30 h. 1.ª sessão de trabalho; 12 h. Almoço; 14 h. 2.ª sessão de trabalho; 19 h. Abertura da 2.ª exposição de Esperanto. Dia 12 — 8,30 h. 3.ª sessão de trabalho; 12 h. Almoço à moda da região; 14 h. Visitas às autoridades e aos principais logradouros; 20 h. Hora de

Arte. Dia 13, domingo — 9 h. Missa solene na Catedral; 12 h. Churrasco na Escola de Tratoristas — Posto Agro-pecuário; 19 h. Sessão solene de encerramento (Colégio N. S. do Carmo); 22 h. Baile no Clube Municipal.

Quota: Individual, Cr\$ 200,00. Membros da família: Cr\$ 100,00. Associações Cr\$ 500,00.

Entre Virchow e Bacelli

Em janeiro de 1902, tendo sido atropelado por um bonde o conhecido professor *Virchow*, de Berlim, pediu-lhe notícias de seu estado o professor *Bacelli*, outro médico de renome mundial, e então ministro da Instrução Pública da Itália.

Respondeu-lhe o médico berlinense com o seguinte telegrama: *Caput ossis fémoris fractum. Spero consolidationem. Gratias multas.*

Toda a imprensa comentou o fato. Lembrou-se que, num Congresso Médico os dois professores já tinham conversado em latim, e concluiu-se logo: “Eis a língua universal! E’ o latim!”.

Este caso é reproduzido pelo professor *Gustave Gautherot*, em seu magnífico livro “La question de la langue auxiliaire

internationale" (edição de Hachette et Cie., 1910). É interessante saber a origem deste livro, que, no dizer de seu prefaciador, o vice-almirante *Bayle*, é um trabalho leal e uma obra-prima de erudição: *Gautherot*, vivendo em um meio hostil à língua internacional, resolveu estudar o Esperanto, afim de combatê-lo. Mas "o estudo consciencioso que fez, com o método rigoroso que aplica em suas pesquisas históricas habituais", converteu-o em fervoroso adepto do Esperanto, dando em resultado o livro, que ninguém lerá sem se tornar favorável à língua criada pelo Médico *Ludoviko Zamenhof*.

Em Roma publicava-se uma revista bimensal, em latim: *Vox urbis* (voz da cidade). Com que dificuldade não lutariam seus redatores, em compor nomes para as cousas e idéias novas, surgidas desde que o latim se tornou língua morta! *Gautherot* cita muitos exemplos, extraídos de *Vox Urbis*: *Locomotiva é currus vaporiheva*; *bicicleta, birota velocissima*; *romance, fá-bula milesia*, etc. Até para os objetos de uso diário tinham de inventar combinações.

O professor *Carlo Bourlet*, em uma conferência feita na Escola Superior de Marinha, salientou não ser possível dizer-se em latim uma frase corriqueira como esta: "Tiro o lenço do bolso de minhas calças", simplesmente porque os Romanos não tinham lenço, nem bolso, nem calças!

Para o latim adaptar-se às relações internacionais, haveria necessidade de refundir totalmente seu vocabulário, sua gramática e sua sintaxe, sendo este difícil idioma "um mosaico de irregularidades e exceções". Segundo o *Snr. Paul Regnault*, professor de sânscrito e de gramática comparada na Universidade de Lyon, eis as "modificações essenciais" indispensáveis: "Supressão das declinações e do gênero, onde fôr inútil; conjugação reduzida às formas estritamente suficientes; substituição, sobretudo com o auxílio das preposições, da construção sintética do latim clássico: uniformização dos sufixos; aplicação da ortografia fonética; admissão dos neologismos necessários, dando-lhes uma forma adaptada ao sistema".

O resultado disto não seria mais latim, mas uma língua artificial, e ainda difícil de aprender.

Em Setembro de 1956 realizou-se em Avignon, França, o "Congresso Internacional de Latim Vivo". Compareceram 160 congressistas, de 22 países diversos. A primeira tese apresentada foi referente à gramática latina. Seu relator, Prof. *Jean Bayet*, diretor da Escola Francesa, em Roma, reconheceu as dificuldades da gramática, principalmente da sintaxe latina, e salientou a grande falta do artigo definido. Seria necessária uma simplificação da língua. Mas na qualidade de latinista fervoroso, êle não deseja a mutilação da língua.

Após muita discussão (em francês, alemão e italiano), no fim de três dias concluíram não convir a simplificação da gramática, mas apenas novos métodos de ensino e conselhos sôbre a pronúncia.

Segundo o Sr. *René Llech-Walter*, que compareceu ao Congresso, a opinião manifestada por vários professores de Faculdades é: "ser absurdo pensar que o latim possa ser uma língua internacional, para todos. O latim ficará sendo sempre língua cultural, apenas para a elite!"

Há 70 anos é usada no mundo uma língua internacional, o Esperanto, cujos princípios fundamentais são: o máximo de internacionalidade das raízes, e a invariabilidade dos elementos gramaticais. Está provada e julgada capaz em todos os domínios da inteligência humana. É a ligação entre todos os povos, que cada vez mais precisam dela. Se temos o Esperanto, deixemos o latim em paz, tal como é: *sit ut est!*

O telegrama do professor *Virchow* poderia ter sido redigido em Esperanto: *Femurosta kapo rompita. Mi esperas cikatrigo. Koran dankon.*

E assim, não só os poucos latinistas, mas milhares de pessoas, no mundo inteiro, ficariam cientes de que o professor havia fraturado a cabeça do fêmur, esperava a cicatrização do osso, e agradecia cordialmente ao colega.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Eis a tradução do trecho publicado no número anterior:

LA MANOJ

Lúcio de Mendonça

Ili naskiĝis ĝemeloj, kreskis unu ĉe la flanko de la dua, kune dividante inter si la varmon de la sama lulilo, de la sama brusto, de la samaj patri-naj karesoj.

La dekstra mano tuj montriĝis *frato* de la maldekstra: en la paro ĝi estas la «viro». Jam en la unuaj monatoj ĝi delikate premadis la mamon, kiu nutris la malfortan korpeton, kaj sekve ankaŭ la fratineton, malpli lertan, kiu en tiuj momentoj inerte ripozis.

Cetere ĝi ĉiam estis pli forta, pli agema, pli entreprenema, pli lerta, pli rapida, pli energia: la plej ĉefa kaj plej malfacila parto de ĉia laboro, la iniciativo en ĉiaj okazoj, ĉiam al ĝi apartenis. Tio estas ĝi, kiu skribas, kiu tenas kaj foliumas libron, kiu manipulas penikon kaj ĉizilon, kiu uzas bisturion, kiu levas martelon kaj pioĉon, kiu turnas borilon, kiu elingigas kaj svingas spadon, kiu malŝargas fajrarmilon, kiu tenas kaj tiras fiŝhokon, kiu pikas bovojn, kiu vipas aŭ moderrigas tirbestojn, kiu direktas ŝpaton kaj falĉilon, kiu sur la remilo pli forte pelas boaton; ĝi manipulas, tranĉas, ŝiras, akvumas, semas, rikoltas; ĝi neas, ordonas, trudas, subjugas, ek-kaptas kaj redonas, retenas kaj repuŝas, savas kaj deĵetas, survangas kaj karesas, salutas kaj benas.

Dume, la maldekstra mano, la fratino, la najbarino de la koro, pli timema kaj modesta, nur observas kaj maksimume helpas, kunlaboras, enmiksigas akcesore, laŭ sia destino de virino.

Estas vero, ke ĉe iuj okazoj — ĉe homoj ambaŭdekstraj kaj maldekstramanaj — la mano maldekstra plenumas la funkciojn de sia kunulo; sed ĉi tiu escepto rilatas la virinojn virecajn, kiaj ĉie ekzistas, en la Historio kaj en la hejma vivo, kaj ankoraŭ konfirmas la ĝustecon de la analogio.

Tial, kaj kiel meritita kompenso, apartenas al la dekstra mano la ĉefeco: ĉe la etiketo ĝi signas la pozicion pli noblan; en la figura lingvo ĝi esprimas distingigon, superecon, forton, povon, la tutan estecon de la persono.

P. C. N.

INTERNACIA ESPERANTO — MUZEO

O Museu Internacional de Esperanto, em Viena (Internacia Esperanto Muzeo en Wien I., Hofburg, Aŭstrio, Eŭropo) kompletou festivamente a 15 de Agosto, 30 anos de existência. Por seu trabalho modelar, paciente, persistente, merece todo o louvor dos esperantistas o seu fundador e conservador, Kort. Kons. Hugo Steiner.

O primeiro volume do Catálogo do material de Esperanto do Museu já foi publicado. Esta grande obra bibliográfica conta 461 páginas mimeografadas. Custa 41 cupões-resposta (ou seu equivalente em moeda) — Para os membros do Museu, 38). Serão publicados oportunamente suplementos.

POST IOM DA TEMPO

Meze en nia laboro, meze en nia aspirado por sukceso de la vivo, subite ion oni povas depreni de ni. Kaj ni staras, kiel post ne atendita bato, iom kapturte ekster la vivo. Ni povas nin refortigi, nin rememorigi kaj tiam estas mirinde, ke ĝuste ne la grandaj, gravaj aĵoj venas antaŭ nia spirito: ne la vivoplanoj, al kiuj ni dumjare esperis, por kiuj ni dum jaroj laboris.

Estas la malgravaĵoj, kiujn ni mal-kontente forskuis de ni, por ne esti bezonata ne rigardi la grandajn vivo-vojojn.

Ne rimarkite ĝi pasis: mano kiu tuŝis la vian, la esperpleno en voĉo, al kiu ni ne aŭskultis. Ne tempon ni havis.

Peter van Weert tion spertis nun unuafoje en sia vivo. Nenion vidante li rigardis el la fenestro, li aŭdis etan voĉon, kiu antaŭ du-tri semajnoj vane provis atentigi lin. Li ĝuste tiam laboris pri nova laborplano por la fabriko kaj tio bezonis ĉiujn liajn liberajn vesperhorojn.

«Paĉjo». Ne respondo. «Ho, paĉjo, bonvolu rigardi». Maria, lia sesjara etulino, kun libro premita inter la manetoj staris ĉe lia seĝo. Fine li rigardis. -Ho, jes, nova libro. Bela, ĉu?» Jes paĉjo. Vi laŭtleĝu por mi!». «Ne hodiaŭvespere. Mi estas tiom okupata. Demandu al panjo, ĉu ŝi bonvolas.»

«Panjo ankaŭ estas okupata. Panjo diris, ke vi laŭtleĝu por mi.» Ŝi malfermas la libron. «Ĉi tiun unu rakonton, paĉjo. Kaj vidu, kian belan bildon apudestas.»

«Jes, vere bela, sed nun vi devas silenti, Maria. Alifoje! Tion paĉjo promesas al vi.»

Silento. Maria ne sin movas. Van Weert denove enprofundiĝis en sia laboro. Tiam ŝi sin klinas, ŝi metas la libron al la piedo de seĝo kaj provas ankoraŭ unufoje: «Paĉjo, kiam vi estos preta, vi legu ĝin por vi mem. Sed sufiĉe laŭte por ke ankaŭ mi ĝin aŭdu.»

«Mi tion faros, post iom da tempo.» li diras. «Vi nun finu la petadon.»

Subite li sin forŝiras for de la fenestro, serĉas ion inter la kolektitaj ludaĵoj de Maria, kiuj kuŝas sur la granda ronda tablo. Jes, tiu nova libro ĝi estis. Foliumante li trovis la «vere belan bildon», kaj mekanike li laŭte legis: «Antaŭ tre longa tempo vivis malgranda knabino en domaĉo de arbohakisto, tre malproksime en granda malluma arbaro. Ŝi estis belega, eĉ tiel ke la birdoj forgesis kanti, kiam ŝi preterpaŝis. Kaj iutage.....»

Dummomente li ne aŭdis nek vidis ion alian. Ankaŭ ne la vortojn de sia edzino, kiam ŝi, malgranda kaj pala en siaj nigraj vestoj, malfermis la ĉambropordon.

«Peter, ĉu vi estas preta? Tiam ni foriru. La aŭtomobiloj jam staras pretaj.»

Ĉar nun estis «post iom da tempo». Van Weert plue legis, laŭte por si mem, sufiĉe laŭte por ke ŝi aŭdu tion. Eble.....

«Wereld»

(El *Semu Konstante*, n-ro 21, 1946).



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,
Medeiros e Albuquerque,
Viriato Correia**

XXXI

“CAMORS” DE BEBERIBE

La vivo de Sanches Lobo en Recife havis nekontesteblan influon sur la mondumon. Li luis elegantan kaj komfortan palaceton ĉe la bordo de rivero Beberibe, ĉirkaŭitan de ĝardenoj; kun riĉaj eksterĉambrojn kaj tien li enloĝiĝis lukse. Bonege vestita, elspezante monon malŝpareme, sed sen parado, li klopodis interrilati kun la plej bona societo.

Post kalkaj semajnoj li estis populara kaj ŝatata en la mondumo, imitataj de ĉiuj junuloj, kiuj tuj akompanis lin mirigitaj pri liaj bonedukitaj manieroj; sinjorinoj kaj fraŭlinoj amindumis lin ekscititaj de la ideo de profita edziniĝo kaj penis preni lin kiel kundancanton, ĉar tiel por ĉiam ili povus vivi en lukso kaj eleganteco.

Ĉutage okazis akceptoj kaj baloj al kiuj post insistaj petadoj li nepre iris; oni devigis lin partopreni en piknikoj kaj kavalkadoj kaj li redonis tiujn grandegajn afablaĵojn per ĝentilaĵoj kaj eĉ ofte per la helpo de sia monujo. Ĉe la jurstudentoj kaj la bohemoj de la literaturo kaj arto, tiuj malgrandaj servoj donis al li famon kaj en senfinaj babiladoj oni eĉ parolis pri la talento de la inteligenta junulo.

Estis ankoraŭ vivanta en la menso de niaj samlandanoj la fama romano de Octávio Feuillet, “Mr. de Camors”, kiu havis influon tiel profundan kaj daŭran sur la junularon de la brazilaj fakultatoj, ke eĉ Joaquim Nabuco (1) ne povis sin gardi kontraŭ ĝi. Tial, kiam Sanches Lobo bonedukita, eleganta, paradoksema, malavara,

foje cinika, foje malica aperis, ĉiuj vidis, en li la tutan portreton de alloga kaj nevenkebla dando, antaŭdestinita por esti admirata kaj timigata, kio estas devigaj kondiĉoj por esti amata.

Flanke de tiuj brilantaj kvalitoj necesaj al monduma sukceso, la junulo havis kuriozajn manierojn, kiuj donis al lia trajto strangan aspekton, tre ŝatatan. Tiel li tute ne ricevis monereton, kiu ajn estus la monbileto prezentita por la pago ĉe la restoracio, ĉe la tajloro, ĉe la parfumisto: ŝajnis, ke en la interŝanĝo de tiaj senvaloraĵoj makuliĝus liajn aristokratajn manojn. Unu tagon, veninte domen por tagmanĝi en societo de amikoj, post plezuriga rajdado, la servisto informis lin ke ne estis akvo en la domo (neregula proviziumo en Recife) por lavi la manojn antaŭ la altabligo, Sanches ordonis, por plenigi la lavovazojn, ke oni malŝtopigu botelojn de tutaj kestoj da “Apolinaris”, la mineralan saŭmakvon, tre ŝatatan en tiu tempo. Ĉiuj aplaŭdis, dissciigis, trograndigis tiujn strangajojn kaj malŝparemon, kaj plie, kopiis ilin ĉar ili estis apartenaĵoj de la eleganta kaj stranga “Camors” de Beberibe.

Eĉ la kriplaĵoj de Sanches Lobo allogis kaj estis imitataj. Li ŝajnis esti iom surda de la maldekstra orelo: ĉiuj junuloj kaj junulinoj komencis ne bone aŭdi ĉe tiu sama flanko. Precipe liaj distriĝoj kaj forgesoj, eraroj de la memorkapablo, famaj forgesoj estiĝis gajaj rimarkoj kaj evidentaj imitadoj en la mondumo. Unu tagon li devis porti gejunulojn al pikniko sur la vojo al Jaboatão, kaj tiam anstataŭ la kotonajn gantojn, kiujn li uzis por direkti veturilon li vestis la kaŭĉukajn gantojn, kiujn juna kirurgisto de Hospitalo Pedro II forgesis en lia domo. Post kelkaj tagoj neniu plu rajdis aŭ direktis veturilon alimaniere ol portante kaŭĉukajn gantojn kiel la kirurgiistoj. Aliajn fojon, perfekte frakvestita anstataŭ porti ceremoniajn ŝuojn, li senatente vestis tenisajn ŝuojn kaj tiel li sin prezentis en la treege eleganta salono de Sino Rosa Galhardo.

Ĉe tiu sinjorino, kiu arigis en sia palaceto la mondumon de la urbo, eĉ okazis fakto, kiu nur dank’ al la ĝenerala kono pri la distriĝemo de Sanches Lobo

(1) Fama brazila verkisto, parlamentano kaj diplomato.

ne kreis malamikon. La okazaĵo estis, ke la mondumo dividiĝis en du kampoj, ĉirkaŭ du virinoj, F-ino Rosa Galhardo kaj Frau Rosa Bayer, kies salonoj estis konkurantoj. Unu estis brazilano, juna, belega kaj preferata de la junularo pro la inteligenteco kaj beleco, la alia estas vidvino trege riĉa, maljuna kaj diable malbela, kies satelitoj estis sukerfabrikistoj, posedantoj de kanmueliloj, politikuloj, markieristoj kaj bankieroj — En ĉi tiu *milito de la du rozoj* Sanches estis por la landa, apud kiu li diris, al aliaj personoj, kiuj admiris ilin kune, kiel belan paron:

Ĉi tie aŭ for de ĉi tie, mi pensas nur al Rosa Bayer...

Pro lia distriĝemo la spritaĵo fariĝis malkonvenaĵo. F-ino Rosa Galhardo mordis al si la lipojn kaj la ĉeestantoj ridegis:

— Tiu Sanches... konfuzas ĉion!

Je alia fojo, kune kun la riĉa Paulino Parestrello, li iris al la Doganejo por porti famajn kaj multekostajn cigarojn el Havano kaj la bonegan kaj blondan ŝarpitan transcitan dispecigitan tabakon, kiu ĵus alvenis por li el tiu urbo. En la nokto li anoncis al la junuloj, siaj amikoj, en la klubo;

— Jen vi havas cigarojn multekostajn kaj dian tabakon...

Kaj li metis la manon en la internan poŝon de la fumovesto kaj el ĝi li prenis cigarujon kaj malfermante ĝin li miris, ne komprenante kial en lia longa kaj maldika cigarujo el blanka metalo ne estis la kestego kun la cigaroj kaj la sako de tabako!

Perestrello, kiu rimarkis la malatenton ekkriis:

— Ĉu do vi pensis enmeti en ladska-toleton pli ol ducent paketojn, kiuj valoras saman nombro da milmilrejoj kaj krome saketo de tabako, kiu estas kvazaŭ alia de oraj moneroj?... Nu, kara Sanches!...

Ĉiuj ridis pro la malatento, pretaj por imiti ĝin, en la plej baldaŭa okazo. Sanches diris, ridetante:

— Tio ĉi estas hereda... mia patro ankaŭ estas malatenta... distriĝema... forgesema... Mi konfuzas ĉion... Mi ne plenumis mian promeson.

Tamen li ne forgesis ion pri lia vivo: tiuj malŝparemo kaj lukso helpis al liaj planoj. Dank'al liaj rilatoj, li plektis afe-

rojn kaj troriskemajn projektojn. Unu el ili estis malhelpi la edziniĝon de Leonor Cavalcante, la plej bela kaj bonedukita junulino el Recife, kun ŝia kuzo Luis Albergaria, riĉa kiel ŝi: pro lia silentemo kaj timo li ne meritis ŝin, diris Sanches al si mem.

— Se mi sukcesos kapti ŝin... tio valoros mian restadon en Pernambuco!

Tiel lerte li agis kaj per tiel ruzaj ĉenoj da tentoj li ĉirkaŭis la fraŭlinon, ke la stelo de la antaŭa fianĉo paliĝis, kaj ŝiaj preferoj por Sanches montriĝis pli kaj pli: li estis kunulo por la valsoj, la rajdadoj, piknikoj, marbanoj en Olinda. Ĝis la neevitebla rompo, kiu ne estis surprizo sed creviĝo por kelkaj virinoj kaj envio por aliaj la sciigo, ke la "Camors" de Beberibe estas la nova fianĉo de la plej bela kaj riĉa el la heredantinoj de Pernambuco. Sed tio ne okazis sen la romanaj frenezajoj, kaj la junuloj diradis, ke, kiel Charlotte de Feuillet, Leonor skribis per plumo malsekigita en la propra sango sian kapitulacon al la nevenkebla Sanches Lobo.

La gepatroj estis mortintaj, gefratojn aŭ aliajn validajn parencojn ŝi ne havis kaj kun la nura societo de la maljuna avino, Leonor estis facila kaj malprudenta kaptajo en la manoj kaj al la malrespektamaĵoj de la aventurulo.

Ŝi jam plendis pro la prokrasto de la adziniĝo, kaj unu nokton Sanches sin prezentas kun malbonsignaj kaj malfortika aspekto, dirante, ke li estas ruinigita kaj minacata pri aresto ĉar li uzis deponitan monon, la sola savrimedo estis pagi ĝin por ke li ne estu malhonorigita. Li petis ducent mil milrejojn por sin savi. Ĉar la junulino kun teruro estis, tiel malfrue! kaptita de doloriga suspekto pri la honoro de la viro al kiu ŝi sin donis kaj kiu estos ŝia edzo, sin montris iom hezilita, Sanches furioziĝis kaj deklaris, ĉantaĝisto malrespektema, ke aŭ ŝi subskribas la ĉekon, kiun li prezentis al ŝi jam kun algluita fiskmarko (ŝi povus tion fari ĉar ŝi estis plenrajtata) aŭ tio estos malhonoro por li kaj ankaŭ por ŝi, ĉar li publikigos ĉion, ĉiujn iliajn senpripensaĵojn. Kaj la ridindaĵoj, la famo!?

Tremante kaj plorante Leonor subskribis. La junulino sin jetis poste sur divanon, kun la kapo inter la manoj, versante larmojn kaj kun la belega brusto agitata de ekscititaj singultoj. Sanches estis enirinta en la internon de la domo por sin aranĝi antaŭ la spegulo pro la malordo de sia figuro sekve de tiu tragika disputado. Dum longa tempo ŝi sin lasis tien. En la dezerta domo ŝajnis, ke estus neniu. La maljuna avino estis en la manĝoĉambro, kun malfermita buŝo, dormetante kiel senpekulo, komferte sidanta sur balancoŝego. La servistaro verŝajne estis en la fundo de la domo, en daŭraj konversacioj.

Leonor, lacigita pro la ploro kaj la atendado, stariĝis kaj faris kelkajn paŝojn aŭskultante la internajn bruetojn. Neniu! Tiam ŝi penetris en la domon kaj vidis ĉion en ordo kaj en soleco kaj vokis:

— Karlo! Karlo!

Neniu respondis. Tiam ŝi eniris en sian ĉambron, lumigitan. Sur la tablo en la centro, inter florpotoj ŝia juvelkofro larĝe malfermita kaj malplena... Interne, papero skribita per krajono kun aliformigitaj literoj, jene:

— Se vi denoncos min mi ĉion raportos!

La sekvantan tagon, Sanches Lobo jam ne estis en Recife.

AFRÂNIO PEIXOTO, Tradukis Y.

Geedziĝo

Geedziĝis en oktobro 1957 niaj samideanoj Astrogilda Guerrini, el São Paulo kaj Dilermando Teixeira, el Belo Horizonte. Ni kore deziras vivon longan kaj feliĉan al la nova paro.

Naskiĝo

S-ro Otaviano Curvelo de Souza, lia edzino kaj kvar gefiloj anoncis la naskiĝon, en la 22-a de septembro 1957, de ilia filo kaj frateto Ari.

Pax Christi

Texto da resolução aprovada no 4.º Congresso Internacional de *Pax Christi*, celebrado em setembro de 1956 em Valladolid (Espanha) (Jornada Esperantista, organizada no quadro do 4.º Congresso).

RESOLUÇÃO

Os membros de *Pax Christi*, reunidos na Jornada Esperantista, após tomar conhecimento do informe da Comissão, adotam a seguinte resolução:

1.º — tomam em consideração os resultados obtidos pelo Esperanto na esfera dos intercâmbios internacionais, da literatura, da ciência e da cultura.

2.º — ficam inteirados da existência de uma Associação de Esperantistas Católicos (IKUE) e reconhecem a comunidade parcial de objetivos existentes entre a dita Associação e *Pax Christi*.

3.º — consideram que os laços estabelecidos entre IKUE e *Pax Christi* devem ser mantidos e aumentados, para proveito dos dois movimentos.

4.º — animam os membros de *Pax Christi* a aprender o idioma Esperanto e a participar da Correspondência Internacional em Esperanto, que é nova seção da CCI (Correspondência Católica Internacional).

5.º — convidam os católicos esperantistas a informar *Pax Christi* dos progressos e resultados de seu movimento, informes que podem eventualmente ser publicados nos Boletins Nacionais de *Pax Christi*.

(Do Boletim da Feder. Esper. Española).

Nekrologo

La familio de nia samideano, membro de BEL, Edésio Guimarães Gonçalves, en Itanhomi. Ŝtato Minas Gerais, komunikis al ni la malĝojan sciigon pri lia morto. Niajn kondolencojn.

RECENZO

Paul Neergaard — LA VIVO DE LA PLANTOJ — Popular-scienca Eldon-Serio N-ro 1, de Stafeto — Eldono de J. Régulo — Eldonisto — La Laguna, Karnariaj Insuloj. 1957. 1 vol. 16 x 24 cm., 128 p. broŝ. Prezo en la libroservo de B.E.L. Cr\$ 250,00.

Paul Neergaard estas talenta mirindulo. Lia tuta nomo estas Pierre Paul Ferdinand Mourier de Neergaard. Li naskiĝis la 19-an de Februaro 1907 en Nyborg, Danlando, kaj lernis Esperanton en 1924, kiam li estis do 17-jara. Eminentata botanikisto kaj lerta verkisto, li eldonis en sia nacia lingvo gravajn verkojn pri sia fako kaj famiĝis kiel sciencisto tra la mondo.

Kiel esperantologo li estas ĝisfundulo, sed ĉiam ĉarme simpla, kies belajn frazojn en prozo oni ofte retralegas kun kreskanta ĝuo, kvazaŭ poezio.

«La Vivo de la Plantoj», kun centoj da belaj ilustraĵoj de Mads Stage, estas senfina ĝuado por la okulo. Religiemaj homoj vidos en ĝi himnon al la Sinjoro de la Vivo, kies mirindaĵojn la scienculo metas sub niaj okulojn.

En la plantoj montriĝas ĉiopova instinkto, sed ankaŭ inteligenta agado, ia saĝo por atingi difinitan celon. Kiam malamiko atakas planton, ĉi tiu inteligente sin defendas, sieĝas la malamikon, batalas por ĝin mortigi per malsato kaj ofte detruas la atakinton en la sieĝita kampo.

Por teni la purecon de sia idaro, la plantoj agas plej ĉaste. Kvankam en la arbaro insektoj kaj vento ĵetas

sur la inajn florojn ĉiujspecajn virajn polenojn, tiuj belaj virgulinoj neniam lasas sin trompi de fremduloj: ili nur akceptas fekundigon el sia propra gento kaj savas ĉiam la honoron de la familio tra jarmiloj.

La Aŭtoro enkondukas botanikon tutan amason da poeziaj popolnomoj de plantoj kaj en la fino de la libro donas kvinpaĝan liston de neologismoj kaj terminoj.

Paul Neergaard ne nur malkaŝas al ni tutan mondon da belaĵoj, pri kiuj multaj el ni nenion suspektis, sed li kreas por ni la lingvon necesan al la klara kompreno de tiu mirinda mondo. Lia kompetento ellaboras la riĉan idiomon por ĝuste kaj precize paroli pri tiu glora regno. Lia influo en la ellaboriĝo de nia lingvo estas netakseble grava.

Ĉio en la libro estas neriproĉebla: lingvo, revizio, preso, papero, ilustraĵoj. Ĉiu inteligenta esperantisto fieros posedi kaj ofte retralegi tiun belan volumon.

—

H. A. de Hoog — LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ — Represo de artikolserio en «Dia Regno» 1955. Eldonis Libroservo de KUNE, Druivenstraat 32, Hago, Nederlando. 1 vol. 32-paĝa 10 x 16 cm. Prezo: Cr\$ 30,00 en la libroservo de BEL.

La Aŭtoro jam donis al ni majstroverkon sub la nomo «Du Malsanoj en Esperanto» kaj denove montriĝas ĝisfundulo, ĝentila, lerta, agrabla majstro de nia lingvo. Leginte lian bo-

negan libron, mi tuj skribis leteron al li petante trian libron, pri alia mal-sano, nome pri la uzado de *ata* erare anstataŭ *ita*, precipe kiam tio fariĝas tro kruela kiel en la esprimoj *esti krumcumata, esti mortpafata, esti pendigata*. Ni esperu lian respondon.

La senpera verbigo de adjektivoj, same kiel la senpera adjektivigo de verboj, estas korekta kaj natura en Esperanto, uzata ekde la «Fundamento de Esperanto» ĝis nun. Ankaŭ en aliaj lingvoj, ĉefe en la hebrea, oni ofte konjugacias adjektivon por esprimi staton aŭ kvaliton kvazaŭ verbo. Komprenoble ĉi tion oni povas fari nur kiam la senço de la adjektivo donas logikan, klaran verbon. Pluraj radikoj efektive povas esti egale rigardataj kiel verbo aŭ kiel adjektivo.

Li finas la belan libreton per jena instruo, kiun ni ĉiuj devas ĉiam memori:

«La averto de S-ro Isbrucker estu do modifita jene:

«1. La Esperantistaro gardu sin kontraŭ senkritika uzado de ĉiam pli multaj verbigitaj adjektivoj.

«2. Ĉi tiu fenomeno, kvankam esenca en la Esperanta vortformado, kaj jam amplekse praktikita de Zamenhof mem, meritas kaj bezonas trankvilan evoluon.

«3. Imitemo kaj ludemo povus kaŭzi misevoluon en tiu fenomeno, kiu estas pli komplika ol ĝi ŝajnas ĉe unua vido.»

Legante la defendon de nia lingvo sub la plumo de tia eminenta gramatikisto, nia koro trankviliĝas pri la estonteco de Esperanto. Neniu estas tro aŭtoritata por misgvidi la evoluon, ĉar

ankaŭ la Prezidanto de la Akademio de Esperanto trovas antaŭ si kleran korektanton.

Delfi Dalmau — DIALEKTO, DIALEKTIKO — Eldono de la Aŭtoro — Barcelona, 1955 — Broŝ. 88 p. 12 x 16 cm. Prezo Cr\$ 100,00 cê la libroverso de B. E. L.

Nia eminenta akademiano Prof. Delfi Dalmau estas lerta instruisto kaj filozofa. Li montras en tiu bonega lernolibro por superaj kursoj de Esperanto, ke ĉiu homo parolas per sia persona dialekto, ke ne ekzistas la ideala unuformeco. Cetere ĉiu branĉo de homa aktiveco havas sian propran dialekton. Ni ĉiuj parolas iel malsame kaj ankaŭ komprenas malsame la frazojn.

Certe la modeloj estas la idealo, sed neniu povas uzi ĉiam la modelojn por esprimi ĉiun individuan penson, ĉar ni ne pensas unuforme.

En ĉi tiu interesa lernolibro li metas inter la ĉapitrojn demandaron por paroligi la lingvon.

Ĉiu ĉapitro de la libro estas interesa legaĵo.

En la manoj de lerta kursestro tiu ĉi libro povos prepari la lernantojn por korekta, flua, eleganta uzado de nia lingvo, kaj estas tre dezirinde uzi ĉie la samajn modelojn, ke la individuaj kaj naciaj diferencoj estu kiel eble malpli grandaj. Mi deziras do tutmondan sukceson al la libro de nia talenta samideano.

I. G. B.

BIBLIOGRAFIO

Charles Baudelaire: LA FLOROJ DE L' MALBONO — Kompletla eldono esperantigita de Roger Bernard, Magda Carlsson, Hilda Dresen, Kalman Kalocsay, Lajoj Tarkony, Henri Vatré kaj Gaston Waringhien, kaj redaktita de K. Kalocsay rilate al formo faj G. Waringhien rilate al senca fideleco. Kovrilo de John Hartley — *Stafeto*, Bel-literatura Eldon-serio, n-roj 8-9 — J. Régulo, eld. La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj, 1957, 490 p. Prezo 250,00.

Por la unua fojo en nia Movado, Stafeto prezentas al Esperantujo tradukon de kompleta poemaro de grande franca aŭtoro, elstara figuro de la tutmonda literaturo. La hela volumo enhavas ankaŭ "La Defalaĵojn" kaj "Fragmentojn rilatajn al La floroj de l' Malbono", detalan biografion kaj du portretojn de la aŭtoro. Ĉiuj literaturamantoj esperantistoj posedu ĉi tiun valoran verkaĵon.

G. P. de Bruin — HISTORIA SKIZO DE LA INTERNACILINGVA IDEO. Eld. Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo F.L.E. Amsterdam. 40 p.

La historiaj verkoj pri la ideo de lingvo internacia (Histoire de la Langue Universelle, Couturat et Leau; Bibliografio de Internacia Lingvo, P. Stojan; Historio de la Mondolingvo de E. Drezén, k.a.) estas de longe elĉerpitaj. En bona horo do aperis tiu "konciza verketo, enhavanta tion, kion ĉiu esperantisto devas scii pri la historio de la internacilingva ideo". La aŭtoro, antaŭ kelka tempo mortinta, estis kompetenta, eminenta samideano.

AMARA PANO, de *József Darvas*. El la hungara tradukis Ladislao Somlai. 112 p. Eld. Dana Laborista Esperanto Asocio. Kontrolita de la Literatura Komitato.

Ĉi tiu verko temas pri la taga vivo en Hungarujo en la jaroj tuj antaŭ la dua mondmilito. La vivon mizeran por kamparanaj helpantoj la libro bone priskribas. Ŝajnas, ke la verkisto vere funde konas

la cirkonstancojn kaj travivaĵojn priskribitajn.

JAPANAJ FABELOJ — Dua eldono, reviziita de Teruo Mikami. Amo-Akademio 1957. 60 p.

Kolekto da japanaj fabeloj transdonitaj generacion post generacio en la prahistoria tempo. Simplaj, naivaj, tamen interesaj kaj tradukitaj en bona lingvo, ĝi meritas legadon de niaj samideanoj.

SUR INSULO MALPROKSIMA — J. VAN HERVET — REMMERS — 80 p. Dansk Esperanto — Forlag, Aabyhoj, 1957. Kontrolita de la Literatura Komitato.

Interesa raporto pri spertoj kaj suferoj en koncentrejo en Deli, parto de la orienta marbordo de la insulo Sumatra (Indonezio).

La libro komencas per klarigo pri geografio kaj historio de la regiono. Sekvas la dua parto, pri kvarjara vivo malantaŭ dorndrata barilo.

J. D. Applebaum: JOZEFO. Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto. Prezento de *Reto Rossetti* — La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1957 — 120 p.

Ĉi tiu originala versdramo finas la unuan dekon da libroj en la beletra serio de *Stafeto*.

La aŭtoro serĉis la temon en la Biblio, lia juneca longedaŭra priokupado, kaj lia decido falis sur Jozefon, filon de Jakob, venditan de liaj fratoj. Tre agrablaj legindaj keksametraĵaj versoj. Bonega eldonaĵo.

Johan Hammond Rosbach — HOMOJ KAJ RIVEROJ — Fasko da rakontoj plimalpli veraj. Eldonejo KoKo — Kopenhago 1957. 140 p.

La aŭtoro de la novelkolekto "Bagatelaro" nun donas al la esperantistaro belan faskon da 20 rakontoj, kiujn oni legas plezure. La unua — "La junulino, la ĉapelo kaj mi" gajnis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj ĉe la 40-a. Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo.

Johano Pignero, esperantista mondci-vitano — HALTO AL LA ATOMISMO — Monopola disvendado pere de S.A.T. (67, avenue Gambetta, Paris XX, Francujo 1957. Prezo: 2 respondkuponoj.

Paĝoj aperintaj franc-lingve sub la titolo "*Halle à l'Atomisme ou le retour d'Orphée*", en la revuo "Contre-Courant", marto 1957. La aŭtoro montras la danĝeron de la atomaj kaj nukleaj armiloj kaj opinias ke ilia fabrikado devas esti malpermesita.

Atendata l' Savanto vin alvokas el Japanujo — Tradukita kaj kompilita de *Kotohiko Macybara*. 39 p. 1957. Leteroj, vortoj kaj verketo pri Reveninta Kristo. Havebla ĉe Amo-Akademio, Tenmori, Kozoji, Aiĉi-ken, Japanujo, Kontraŭ 2 respondkuponoj.

LA MANAGERO-MALSANO. Eld. de Werbeamt der Deutschen Bundesbahnen-Germanujo. Bonegaj konsiloj por eviti aktualejn malsanojn pro la senkompata porekzista batalo de la moderna vivo, kun trostreĉo de la nervoj.

Poŝtkarto kun muziko de la Festivala Salut-Kanto. VI Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj — en Moskvo, 1957.

Vizitu Skandinavujon (Danlando, Norvegujo, Svedujo, Finnlando), vojaĝante per la ŝipoj de D.F.D.S.

Johano Pignero — Esperantista mondci-vitano — KIO ESTAS LABORISTO? (pri la laborista Eŭropo). Verko jam publikita en la revuo *Contre-courant*, Paris Diras Pignero: "Jen la kvar kvalitoj, kiuj permesas al mi difini la laboriston: Tiu estas viro, kiu ŝatas sian laboron, kies laboro estas utila al la aliaj homoj, kaj kiu, laborante, respektas sian propran dignon kaj la dignon de la aliaj homoj. (Mi nomas digno la staton en kiu ĉiu homo vivas, kaj laboras en sereneco, ne alportante iun rektan aŭ nerektan, tujan aŭ malproksiman baron al la vivo kaj laboro de la aliaj homoj)".

Esperanto sen vortoj — Interesa verko por ligi pri firme la rilatojn inter Esperanto kaj la fotografio. Petu al Gazetara

Servo de Gevaert Photo-Produkten N.V., (Mortsel — Antverpeno, Belgujo).

Interŝtata Komitato por Eŭropa Migrado. — IKM. (Comité Intergouvernemental pour les migrations européennes — CIME. — Faldprospekto disemita al la tutmonda Esperantistaro — Konciza sed sufiĉe kompleta supervido pri la verko de organizacio internacia, grupiganta 28 regnojn (inter ili Brazilo) kun la celo helpi kandidatojn por elmigri regionojn superloĝatajn de Eŭropo.

La internacia informlibro — (War Resister's International, 88 Park Avenue, Enfield, Middlesex, Anglujo). Ĉi tiu 16-paĝa broŝuro celas respondi la plej oftajn demandojn faritajn pri la landoj, kiuj laŭleĝe agnoskas la militrifugantojn, havas la plej bonajn leĝojn, kaj kie ne ekzistas la deviga militservado, k.t.p.

Libreto pri "Eifelturo" ornamdesegnado, fundamento de la Ornamografio kreita de S-ro N.B. Havkin kaj dediĉita al la Zamenhof-fondo en Jerusalemo, Izraelo, Poŝtkesto 804. Ĉiu ekzemplero 2 int. resp. kuponoj.

SLOSILO DE LA LIBRETO "EIFELTURU" Esperanta eldono. Desegnado en kajeroj por aritmetiko. Eldonejo Zamenhof-Fondo. P.K. 804, Jerusalemo, Izraelo.

Tri broŝuroj pri bibliografio: de *Japana Literaturo* tradukita en Esperanto; de *Scienca Literaturo Esperanta* en Japanujo; kaj de *Medicina Literaturo Esperanta* en Japanujo. Publikigitaj okaze de la 43-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj por la 50-a jara Jubileo de Japana Esperanto-Movado, 1956. Tiuj bibliografioj montras evidente la progreson kaj disvastigon de Esperanto en Japanujo.

BONVENON AL OSLO, ĉefurbo de Norvegujo. Faldprospekto.

MIA HEJMO — Prospekto pri internacia konkurso pri infanaj desegnaĵoj ĉe la Ligo de la Societoj "Niaj infanoj", en Zagreb, Jugoslavio.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

RIO DE JANEIRO

Por Efektivigo de Latinamerika Kongreso de Esperanto

Oni tre ofte diras, ke per Esperanto la lingvaj limoj estas venkataj. En ĉi tiu artikolo mi rimarkigas, ke Esperanto ne nur malaperigas tiajn limojn sed, plue, ke ĝi neniigas la sentojn de fremdeco. Personoj, kiuj vojaĝis tra samlingvaj landoj, scias kia estas tiu sento: oni malfermas la buŝon iomete kaj la enlandanoj jam demandas, el kie oni esta veninta; kaj post restado de kelkaj tagoj en tia samlingva lando oni sentas sin devigita ne uzi, por multe da aferoj kaj agoj, la samajn vortojn kiujn oni uzas ordinare, por eviti, ke estu miskomprenataj niaj petoj pri la plej trivialaj aferoj, kiel, ekzemple, manĝaĵoj, trinkaĵoj k.t.p. Tiel oni forlasas iajn landojn bone impresita pro ilia beleco, sed kelkfoje ankaŭ laca esti ĉiam demandante pri la signifo de tiom da esprimoj, kiuj oni neniam aŭdis antaŭe.

Dum la lernado kaj legado de Esperanto oni nur iomete kaptas tiun ĝian econ; per korespondado kaj partoprenado en kunvenoj oni sentas ĝin pli forte, sed estas en kunvenoj kun samideanoj el diversaj landoj en kiuj tiu eco montras pli klare kaj impoŝian valoron. En tiaj okazoj oni aŭskultas malsamajn parolajn ritmojn sed la vortoj parolitaj estas ĉiam laŭ la sama modelo. Estas vere mirinda la sento, kiu fluas en nin, ĉeestante kunvenon aŭ kongreson de diverslandaj sa-

mideanoj pro tio, ke oni sentas sin kvazaŭ en familio.

Mi kredas, ke tiu ĉi sento ludas gravan rolon por la fortigo de nia movado, kaj ke ĝi devas esti kulturata per pli da kongresoj, kun bone elpensita socia programo. Partoprenintoj de la Esperanta Kongreso de Niteroi havas klaran ideon pri ĉi tio, ĉar ili ĝuis ok tagojn de tre agrabla kunestado, kies memoro restas neforgeseble en niaj koroj.

Mi pensas, ke en nia Esperanta familio mankas, ekzemple, unu gravan kongreson: tio estas Latinamerika Kongreso de Esperanto. Ĉiu esperantisto deziregas partopreni Universalajn Kongresojn, sed la vojaĝo de Ameriko al Eŭropo estas tiel multekosta, ke nur malmulte da samideanoj povas sin regali per tiu plezuro. En la XV-a Brazila Kongreso de Esperanto oni jam rimarkis la ĉeeston de kelkaj alilandaj samideanoj; tio certigas, ke Kontinenta Kongreso estos vere bonvenigita de ĉiuj kiuj volas senti la internaciecon de nia lingvo, kaj certe la kongreso utilos ankaŭ por plifortigi la movadon en ĉi tiu parto de la mondo, en kiu kelkaj nacioj tre malmulte aŭdas pri Esperanto.

Post Kontinentala Kongreso, estus pli facile iam festi, en Latinameriko, Universalan Kongreson kaj ankaŭ pli grandigi la nombron de vojaĝantoj al Universalaj Kongresoj organizotaj en Eŭropo.

M. Zubieta

PLANO DE ORGANIZO DE LA BRAZILA ESPERANTO-MOVADO

Fino

- anonci societan programon;
- anonci sukcesojn de la movado.

- (2) Raporto, kontrolo, statistiko.

20. EKZAMENOJ

- a. Internaciaj normaj (BEL).
- b. Praktika aplikado de la normoj.

IV — KULTURA VIVO

21. ĜENERALAJOJ

- a. Kio estas kulturo.
- b. Principoj:
 - (1) Lingvo venkas nur per sia kulturo.
 - (2) Ĉiuj agadoj de la grupo servu la kulturajn agadojn.
 - (3) Konstanta strebado al pli alta nivelo (sed kun piedoj firme restantaj sur tero).
 - (4) La kultura nivelo ne altiĝu nur por pli kaj pli etiĝanta kerno (la kerno konservu solidajn kontaktojn kun la bazo, kun la ekstera vivo, kun la nuntempa mondo kaj la samtempuloj).
- c. Celoj
 - (1) Igi intelekto alloga nian movadon.
 - (2) Formi embrion de tuthomara kulturo.

- (3) Diskrete kaj digne varti la Zamenhofan Spiriton kaj la Internan Ideon.

d. Limoj

- (1) Inter informado kaj kultura vivo.
- (2) Inter instruado kaj kultura vivo (instruado ebligas sin apogi sur pli alta nivelo).

22. ORGANIZO

- a. Komisiono por kultura vivo.
- b. Ĝiaj Esperanto-rilatoj.
 - (1) Kun la societo:
 - estraro;
 - komisiono por informado;
 - komisiono por instruado.
 - (2) Kun Brazila Esperanto-Ligo.
 - (3) Kun Universala Esperanto-Asocio.
 - (4) Kun aliaj lokaj societoj.
- c. Programo de la komisiono.
- d. Budĝeto.

23. INTERNA AGADO

- a. Diversaj tipoj de kulturaj kunvenoj.
 - (1) Klerigaj kunvenoj (studrondo pli ampleksa).
 - (2) Specialaj aranĝoj (vesperoj kun difinita celo)
 - Zamenhofa, literatura, ktp. vesperoj;
 - Letervesperoj, ktp.

- (3) Festoj
 — Scenejaj;
 — balaj;
 — ktp.
- (4) Kulturaj ekskursoj (kun kultura programo).
 — ekskursoj kun anoj de pluraj societoj, kun starigo de esperantolingva programo.

b. Diversaj progreroj

- (1) Lingvo-instruaj.
 — komuna komentata legado;
 — perfektigaj ekzercoj (gramatikaĵoj, tradukaĵoj, ktp.).
- (2) Distraj-amuzaj
 — ludoj;
 — komuna kantado;
 — komuna dancado;
 — rakonto de humuraj anekdotoj;
 — konkursaj taskoj el la gazetoj.
 — ktp.
- (3) Distraj-klerigaj
 — komuna aŭskultado de radio, diskoj, kpet.
 — teatraĵoj — skeĉoj fare de amatora trupo);
- (4) Klerigaj-kolektivaj
 — gvidata diskltado;
 — debatoj «por» kaj «kontraŭ»;
 — parola gazeto (ankaŭ sub formo de «radioelsendo»); kun esperantokroniko kaj raportojo pri la movado;
 — leterkunveno (letervespero);
- kolektiva korespondado.
 (5) Klerigaj-dekatedraj
 — prelego:
 — preparita de societano;
 — farita de vizitanta esperantisto;
 — interŝanĝita kun aliaj societoj (eble per uzo de magnetofona bendo);
 — recenzoj (pri esperantaj aŭ aliaj verkoj);
 — paroladeto pri difinita temo;
 — rakonto pri vojaĝo, kongreso, legita libro, ktp.
 — komentita projekciado (lumbildoj aŭ amatortora filmo);
 — deklamado (poezio, altastila prozo, humuraĵo);
 — faktika psikologio).

c. Programoj

- (1) Dekunveno.
 (2) De sezono (nepre plani kaj anonci longe antaŭe).

24. PUBLIKA AGADO

a. Ĝeneralaĵoj

- (1) Publika agado por Esperanto:
 — rezulto de kultura vivo, agado, propagando, informado.
 (2) Ĝi estas nia kultura agado diskonigata al la Publika.

b. Nia kulturo uzas publikajn ilojn

- (1) Gazetaro.

- (2) Radio.
 (3) Filmo.
 (4) Libro (nacilingva traduko de famaj Esperanto-aŭtoroj).
- c. Publika agado de nia kulturo.
 (1) Ekspozicioj
 — Esperantaj:
 — de la Esperanto-libro, Esperanto-gazetoj, ktp;
 — de la Esperantomovado, Esperantokulturvivo, ktp.
 — Alitemaj:
 — en kiuj Esperanto ludis rolon (kollektadon, ktp);
 — en kiuj Esperanto ludis neniun rolon (partopreno de la Esperantosocieto en la loka kulturvivo); kiel la ekspozicioj:
 — artaj (pen-traĵoj);
 — bibliofilaj;
 — infandeseĝnaj;
 — poŝtmarkaj;
 — ktp.
- (2) Publikaj kunvenoj.
 — Nacilingvaj.
 — Esperantolingvaj kun traduko.
- (3) Kultura prelego.
- d. Diversaj agadoj
 (1) Inaŭguroj (Esperantomonumentoj, Esperantostraĵoj, ktp).
 (2) Diservoj kun prediko en Esperanto.

e. Apartaj agadoj.

- (1) Partopreno en agado de societoj neesperantistaj.
 (2) Politiko de la ĉeesto, la interhelpo kaj la aktiva partopreno).

25. KULTURAJ INTERŜANĜOJ

a. Ĝeneralajoj

- (1) Kulturaj interŝanĝoj per Esperanto havas por ni gravegan propagandan valoron: esperantistoj pli facile ol aliaj povas interŝanĝi kun homoj el aliaj landoj.
 (2) Tion sciante, ni tamen turnu nin unuamove al la kultura intereso. La informa komisiono scios, ankaŭ ĉi tie, ekspluati nian agadon.
 (3) Brazila Esperanto-Ligo tre helpas tiurilate.

b. Rimedoj — Interŝanĝo de:

- (1) Manuskriptoj de prelegoj, magnetofona registraĵo, ktp.
 (2) Invito de la preleganto mem.
 (3) Prelego kun lumbildoj aŭ akompanata de ekspozicimaterialon.
 (4) Prelego akompananta ekspozicimaterialon.
 (5) Teatraĵoj Esperantlingvaj aŭ ne.
 (6) Teatraĵoj magnetofone registritaj.
 (7) Diversaj kulturaj dokumentoj malfacile troveblaj en la internlandaj urboj.

DIPLOMOJ

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon
jenaj esperantistoj:

NORMA ELEMENTA DIPLOMO

*Brazila Klubo "Esperanto", Rio de
Janeiro, DF.:*

Jorge Campos de Oliveira
Carlos Antonio Teixeira Barbosa
Irene dos Santos Machado
Marcos Franco Arruda
Bianor Collect de Araújo
Alaíde Souza
José Fortunato Pinto
Walter José Nogueira
Pedro de Aquino Xavier
Irene Araújo Monzon Abril
Iolanda da Silveira Soares
Osório Virgílio Câmara da Silva
Carlos Roberto Alves
Paulo Pereira dos Santos
Paulo Machado Moreira
Wanderley Sabino da Silva
Maurício Monken Gomes

*Federação Espirita Brasileira, pere
de B.K.E.:*

Madalena Dias de Seixas
Eolo Jorge Lacerda Loureiro
Demétrio Pedro Jorge de Sant'Ana
Euclides Fernandes
Plácido Alves de Oliveira
Alice Maia

*Niterói Esperanto-Klubo, Niterói, Stato
Rio de Janeiro:*

Magdá dos Santos Finne
Lúcia Guanabarinó

Célia de Macedo Portela
Iris de Araújo
Nitócris Araújo
Luís Muniz Carneiro
Maria Leticia Baptista Pereira
Euclides Vicente Pascoal
Eunice Rocha Caspery
Hebe Ferreira
Isabel Klausner
Vera Dias de Castro
Edith Frank Fernandes
Antonio Walas Vodopives
Maria Elza de Castro Vasconcelos
Lídia Gonçalves Ramos
Aurea Gomes Cruz
Aulina Marta de Oliveira
Januário Martins da Silva Filho
Renato de Lacerda
Ernani Klausner
Benedito Jordão de Sousa
Mirian Raimundo Serrão
Diná Tavares
Natalina Pimentel Campista
Altair da Anunciação Pereira Caldas
Irany Figueiredo Teixeira
Celso Augusto Bittencourt Rosas
Alcide Cardoso Amaral
Dalva Alegria Guimarães
Edna de Vasconcelos e Silva
Jurema Nóbrega de Araújo
Lulexia de Almeida Menezes
Lenir de Miranda Cunha
Bernardo Selemón
Paulo Roberto Tourinho de Carvalho
Jorge de Noronha
José Pereira Pinto
Délia Vaz Guimarães
Jorge Pimentel
Hilma Valente de Moraes
Aélia Pacheco Gomes
Ieda Alfradique
José Hugo Rodrigues
Mário Roberto Bastos de Carvalho
Delma Eyer
Iara Santos
Maria Auxiliadora Ornelas
Acir de Azevedo Marques
Cláudio Araújo da Silva
Elnemar Oliveira da Silva
Lideia de Figueiredo
Láise Eyer

c. Temoj de la prelegoj, ktp

- (1) Scienco, arto, literaturo,
ktp.
- (2) Popolkutimoj, folkloro.
- (3) Ĉiutaga vivo, vivmanieroj,
vivmoroj.

*S. Paŭlo Esperanto Klubo, São Paulo,
Ŝtato São Paulo:*

Deodato de França Melo
Renato Frezatti
Irineu Cardoso da Silva
Araci Rhormens
Maria de Lourdes Monteiro
Ório Marques Costa
Edmundo Pascoal Spina
Takumi Murakami
Anália Cortês de Melo Monteiro

*Clube de Esperanto de Barbacena,
Barbacena, Ŝtato Minas Gerais:*

Antonio Ferreira de Oliveira
Nelson Noronha Neto
Ana Maria Alves Cobra
José Salvador Nadalin
José Cobra
José Rodrigues de Almeida
Lincoln Antunes
Ari Lopes
João Baptista Jorge Pinto
Geraldo Simão de Castro
Valdemar Fernandes Meneghin

*Colégio Estadual e Escola Normal
João Gomes de Araújo, Pindamonhan-
gaba, Ŝtato São Paŭlo:*

Amador Bueno de Camargo
Benedito Marques Monteiro
João Laerte Sales
Maria Inani Rovedo
Marilda Aurélia Monteiro Giannico
Mariza Aparecida Monteiro Giannico
Marly Rose de Machado Franco
Reinaldo Muassab Silva Lima
Suzana Maria Santoro

*Sociedade dos Amigos da Língua In-
glêsa, Taubaté, Ŝtato São Paŭlo:*

Aloísio Moreira
Edemir Figueira
Julieta de Mello
Evani Figueira
Ruth Guimarães
Jacira de Mello

Eurico Figueira
João Toniolo Freire
Juvenal Tavares da Silva
Altivo José Medeiros

Per korespondado:

Helena Maria Bandeira Lopes Ferreira,
Caratinga, MG
Vilany Cruz Oliveira, Fortaleza, CE
Regis Oliveira Muzzio de Paiva, Fortaleza,
CE
Jatir Gonçalves Vieira, Itanhomi, MG
Álvaro Claudiano Carvalho, Salvador, BA
Carlos Olímpio de Almeida Alves, Salva-
dor, BA
Inêzia Camelyer de Souza, Salvador, BA
José Siquara da Rocha, Salvador, BA
Gilberto Cardoso Silva, Belo Horizonte,
MG
Carlos de Almeida Wutke, Uberlândia, MG
Antonio de Araújo Silva, Uberlândia, MG
Manuel de Almeida Barbosa, Uberlândia,
MG
Marta Guanabara do Nascimento, Uber-
lândia, MG
Norma Fagundes da Costa, Uberlândia, MG
Alan-Kardec Peraniui, Uberlândia, MG
Idalina Rossi Pedrosa, Uberlândia, MG
Eurídice Cabral Bernardino, Uberlândia,
MG
Dora Lúcia Teixeira, Uberlândia, MG
Maria Madalena Pedrosa, Uberlândia, MG
Creusa Guanabara do Nascimento, Uber-
lândia, MG
Dioma Silveira Lima, Uberlândia, MG
Ernestino Alves Teixeira, Uberlândia, MG
Fernando Maluf Wutke, Uberlândia, MG
Carlos Maluf Wutke, Uberlândia, MG
Elizabeth Alves, Uberlândia, MG
Edson Vieira dos Santos, Uberlândia, MG
Iolita de Paula, Uberlândia, MG
Dilma de Paula Almeida, Uberlândia, MG
Antonio Joaquim Pereira, Campinas, SP
Enaura Batinga de Mendonça, Salvador,
BA
Antídio José Vargas, Lajes, SC
Maria Augusta Baptista Furtado, Tere-
sina, PI
Cândido Bravo, São Paulo, SP
Doraci Bispo, Campo Grande, MT

Sonia Ferraz, Campo Grande, MT
 Renato de Souza Ferreira, Campo Grande, MT
 Ivair Luísa da Fonseca, Campo Grande, MT
 Jeronimo Gonçalves da Fonseca, Campo Grande, MT
 Ventura Teresino Meneses, Campo Grande, MT
 Joantina Garcia Pereira, Campo Grande, MT
 Edith Lima de Resende, Campo Grande, MT
 Hélio Avelino Resende, Campo Grande, MT
 Marilda Avelino Resende, Campo Grande, MT
 Teresinha Gonçalves da Rocha, Campo Grande, MT
 Neusa Pereira dos Santos, Campo Grande, MT
 José Martins Coelho, São Miguel Paulista, SP

NORMA SUPERA DIPLOMO

Brazila Klubo "Esperanto", Rio de Janeiro, DF:

Jorge Soares das Neves
 Floriano Pessoa
 Mário Severiano de Souza

Per korespondado:

Petronio Ramos Burger, Lajes, SC

PROFESORA DIPLOMO

Brazila Klubo "Esperanto", Rio de Janeiro, DF:

Mário Severiano de Souza

Laŭ la Artikolo 23-a de la Regularo

Carlos Juliano Torres Pastorino

Opinião sobre a Língua Internacional

A língua internacional é tão necessária e indispensável, como são igualmente os sinais usados pela música e os símbolos da aritmética, da álgebra e da química.

Prof. Jean Timmermans, ex-Ministro de Instrução Pública da Bélgica.

ANONCETOJ

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde kvanton kontraŭ kvanto. Adreso: Stefan Bieganski, przez Ostrow Wlkp., Mikstat, Polujo.

Deziras interŝanĝi alumetetiketojn ĉiulande. Adreso: Kreitzer Robert, Štolcova 11, Brno 18, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi pri terkulturo. Adreso: Goro Ito, 565 Furutsu Niitsu-ŝi, Niigata-ken, Japanujo.

R E T O R I K O

kun aparta konsidero

al

ESPERANTA PAROLARTO

Originale verkita en Esperanto de

D-ro Ivo Lapenna

Prezo Cr\$ 200,00

E L L E R N U !

Progresa Kurso de Esperanto

Verkis: D-ro Francisco Szilágyi

Prezo Vr\$ 80,00

L A F A R A O N O

de

Boleslaw Prus (Aleksander Glowaski)

Tradukis el la pola lingvo

Kabe (Kazemierz Bein)

2-a eldono

3 volumoj binditaj Cr\$ 720,00

LIBROSERVO DE B.E.L.